

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Aŭgusto 2023

55-a jaro


N-ro 193

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaŭ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulinia-SP



108-a Universala Kongreso de Esperanto

29-a Julio - 5-a Aŭgusto 2023

Torino - Italujo

Esperanto - Lingvo por justa mondo

KARAJ GLIGANOJ!

Ja, mi konscias, ke iom koleretaj vi estas pro la malfruigo de ĉi aŭgusta LVL; mi eĉ ne kuraĝas prezenti al vi nepardoneblajn pretekstojn por klarigi tioman prokraston - tutsimple mi pente klinas la kapon kaj promesas fari mian plejon por reakiri la normalan aperritmon.

Ĉi-jare, escepte de la UK-stampo, neniu alia esperantaĵo aperis, sed surprize sur la koverto, enhavanta la revuon *Pola Esperantisto*, mi ekvidis du nekonatajn glumarkojn. Unu estis farita por la evento



33^{aj} *Esperantaj Tagoj de Krakovo*, 3-5.6.2022 (40x40mm) kaj la alia okaze de la 39^a Pola kongreso en Łódź, 23-26.06.2022 (45x25mm). Estante pasia glm-kolektanto, mi kontentis, ke ankoraŭ oni em-



as eldoni ĉi belajn, ne altkostajn, propagandilojn. Ĉio ĉi memorigis al mi, ke lastatempe mi estis aĉetinta areton da glumarkoj, ĝis nun ne ankoraŭ de mi kontrolitaj. Jen interesa surprizaĵo: inter tiuj mi trovis la ĉi-flankan glm-on. Sur helverda fono, diversaj nuanc-oj de bruno desegnas la portreton de juna LLZ kaj la blankaj surskriboj sciigas ke temas pri *E. Poŝto 2 steloj Studento kreinto de E.* Sed mi scias nenion pri ĝi: ĉu eble vi? Kiu min helpos malkaŝi la misteron? **ED**



ENHAVO

Elda DOERFLER - <i>Vortoj de via prezidanto</i>	2
Albert BOON - <i>Hiatoj en la historiografio de la Esperanto-Movado - Esperanto en la faŝista epoko (I)</i>	3
James REZENDE PITON - <i>Ekde prafilatelaj tempoj, pluraj lingvoj en Italio</i>	7
REDAKCIA INFORMO - <i>Esperanto en filatela evento de Brazilo</i>	10
Elda DOERFLER - <i>Subskriboj de Zamenhofoj</i> (Je la 6-a paĝo estas prie kelkaj notoj)	11
James REZENDE PITON - <i>Poŝtrepagoj (Nachnahme) - Pagu min, bonvole!</i>	20
Elda DOERFLER - <i>Torina UK 2023 kaj Filatelo</i>	22
EN POŝTOKESTO - <i>Liganoj skribas, ke ...</i>	23

HIATOJ EN LA HISTORIOGRAFIO DE LA ESPERANTO-MOVADO

ESPERANTO EN LA FAŜISTA EPOKO (1)

Albert BOON

**“Esperanto-anoj estas
nek anĝeloj, nek diabloj.”**

Elda DÖRFLER

Enkonduko

Abundetas artikoloj kaj libroj, kiuj priskribas kaj foje klarigas la historion de la Esperanto-movado aŭ tiun de pioniroj kaj aliaj eminentuloj. Tamen, la aŭtoroj sufiĉe ofte kopias unu la alian, probable ne ĉiam post kontrolo de la faktoj.

Indas menciigi la laŭdindan verkon “Esperanto sen mitoj – mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado”, de Ziko Marcus Sikosek. Elstara verko sendube, sed ankaŭ ĉe li mankas kelkaj malagrablaj faktoj. Nu, silenti estas alimaniere mensogi aŭ almenaŭ trompi sin kaj aliajn. Esperantanoj fakte estas kaj estis ofte nek anĝeloj, nek diabloj!

Verko kiu lerte preterpasis la varmegan kaŝon, estas la tamen bonege subkonstruita esearo de Ulrich Lins, “La danĝera lingvo – Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto”. Ankaŭ ĉe li preskaŭ nenio pri la fia kunlaborado de esperantistoj kaj nedemokratuloj kiel Hitlero, Musolino, Franko ktp.

Instigo

La hazarda trovo de itala membrokarto esperantista (kaj faŝista) el 1932-1933 kaj la malkovro sur ĝi de ne vere raraj, sed historie interesaj glumarkoj (minimume 2300 ekz. dum kvar jaroj) estis la filatela instigo al ĉi artikolo.



Sur membrokarto unika (kun persona foto, subskribo kaj nomo de la esperantisto) troviĝas kvar glumarkoj kiel atestoj de la membreco de tiu persono en la jaroj 1932 ĝis 1936. De post 1936 li eble ne plu pagis la kotizon aŭ ne plu gluis la glumarkojn sur la membrokarton pro diversaj

eblaj kaŭzoj. La priskribo montros de kiu asocio li estis membro kaj en la itala estas aldonita la regularo por la tiamaj libervolaj anoj.

Priskribo



Sur la maldekstra parto:

Maldekstre: itallingva teksto, priskribanta la rajtojn de la F.E.I.-membroj;

Dekstre: foto kaj subskribo de la membro;

Sube: “La jena **Membrokarto**, pro kontrakto inter U.E.A. kaj F.E.I., rajtigas - sub reciprokeco - la Membrojn de Itala Esperanto-Federacio senescepte je la praktikaj servoj flanke de S-roj Delegitoj de U.E.A. en la tuta mondo.”

Tute sube: kvar glumarkoj diverskoloraj (1932-33 / 1933-34 / 1934-35 / 1935-36). La glumarkoj similas la blazonon sur la dekstra parto. La blazono konsistas el verda steleto sur blanka fono, mallongigoj vertikale “F.E.I.”.

Meze - oblikve “**ESPERANTO**” en verda koloro. Ĝenerale nigra fono kaj maldekstre-sube: “**LINGVA [...] ROMANA [...]**”.

Tute sube sur la markoj laŭjare: XI EF. OG / XII EF. OG / XIII EF. OG / XIV EF. AG. EF signifas ‘Erao Faŝisma’-n.

Dekstra parto:

Supre-meze: blazono de F.E.I. (= Federazione Esperantista Italiana)

Surskribo: “**FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA ENTI CVLTVRALI APARTENANTA AL F.P.M. FASCISTA**”

Sub la blazono: “**CENTRA SIDEJO KAJ ADMINISTRANTA - SEKRETARIA OFICEJO**”

ESPERANTO – CENTRO ITALIA

GALLERIA VITTORIO EMANUELE 92 - MILANO -

CONTO CORRENTE POSTALE 3/18715"

Tute sube: MEMBROKARTO N. 2300

de S.^{ro} FACHETTI Antonio

en MILANO

de la Grupo "Esperanta Domo"


P.[OR] LA PREZIDANTO DE F.E.I. (reliefe, stampo) LA GRUPA PREZIDANTO

(Gen.le Marchese C. Cordero di Montezemolo)

(mankas la nomo)

Rimarko:

Nia Elda sendis al mi la nomon kaj portreton de la tiama prezidanto, kies persona nomo mankas sur la membrokarto. Pro tio nian koran dankon!



Carlo Cordero de Montezemolo (1858-1943) estis markizo, italo, generalo en pens. Atinginte la rangon de majoro antaŭmilito, forlasis la soldatan servon, sin dediĉis al kulturo de siaj grandaj bienoj. Dum la milito komandis montaran artilerian regimenton; li estis vundita. Liaj du filoj mortis en la bataloj. Li loĝis apud Livorno. Tuj post la milito li esperantistiĝis, vigle laboris por Esperanto. Post kelkaj jaroj fariĝis prezidanto de IEF. Prezidis plurajn italajn kongresojn.


Li mortis en la jaro 1943-a.

Fonto: "Enciklopedio de Esperanto", unua eldono, 1933-1934 p. 376.



Treege interesa la artikolo de nia kunredaktoro, Albert Boon, de kiu mi profitas por aldoni kelkajn sciigojn pri la milana sidejo de Federazione Esperantista Italiana - Itala Esperanto-Federacio.

Sur la antaŭa paĝo videblas poŝtkarto, tutcerte eldonaĵo de la jaroj 1931-32, pri la Galerio *Vittorio Emanuele*, kie havis sian sidejon la “Itala Centro por Esperanto”, nome la Esperanta Domo. Je ĝia dekstro, pligrandigo de la vorto “Esperanto”. La flankan kaj pli suban bildojn mi *ŝtelis* de la tt-ejo “Esperanto 125”, zorgita de Davide Astori, kun tekstoj liaj kaj de Nicola Reggiani ĉe <http://www.trapassatoefuturo.it/125/schede/035.html>. De tie venas, tre koncize, kelkaj konoj pri la “Esperanta Domo”. Ĝi estis starigita danke al la iniciatemo



Esperanto - Centro Itala en Milano - Ekstero

de la itala esperantisto inĝ. Rinaldo Orenco, kiu iĝis la motoro ne nur de la milana, sed ankaŭ de itala movadoj. En la ejoj situantaj en tiu

prestiĝa milana Galerio, trovis lokon la restarigita Itala Federacio kaj la Katedro de Esperanto, ekde 1931. Rinaldo Orenco (1895-1991) studis inĝenieran fakon en la Supera Reĝa Politeknika Lernejo, Torino, en la sama konstruaĵo kie havis sian kongresejon la 108^a UK, 2023. Esperantisto ekde la 1920^{aj} jaroj, li tuj ekaktivis kiel verkisto, tradukisto kaj propagandisto. Li estis kunorganizanto de la UK en Romo (1935). Rinaldo Orenco estis tre agema ĝis la eksplodo de la 2-a mondmilito. La Galerio, kie havis sian lokon la Milana E-grupo, estis bombita de angla aviadilaro, inter la 14^a kaj 15^a de aŭgusto 1943. Ĝi estis rekonstruata de 1948 ĝis 1955.

E. D.



Esperanto - Centro Itala en Milano - Interno

Paĝo 13-a: foto de grupo, ĉe <https://jenikirbyhistory.getarchive.net/amp/media/zamenhoftombo-1922-9a03e2>

Paĝo 17-a pri J. M. Warden: en la 1^a numero, jarkolekto 1, 2014, de la revuo *Esperanta Numismatiko*, organo de Esperanto Numismatika Asocio (ENA) je la paĝo 10^a, iniciatoro de ENA kaj redaktoro, nia samligano kaj samredakciano Albert Boon, publikigis tre interesan artikolon pri E-medalo dediĉita ĝuste al S-ro J. M. Warden en 1929. Ĝi legeblas ĉe: <http://frali.bplaced.net/ena/ena201401.pdf>

Paĝo 19-a: https://eo.wikipedia.org/wiki/Zofia_Zamenhof


EKDE PRAFILATELAJ TEMPOJ, PLURAJ LINGVOJ DE ITALIO

James REZENDE PITON (BRAZILIO)

La gastiganta lando de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (en Torino) kaj ILEI/TEJO-kongresoj (en Lignano Sabbiadoro) estas la hejmo por sia oficiala lingvo, la itala, kun ties sennombraj lokaj dialektoj. En Italio cetere plu vivas kelkaj aliaj malgrandaj lingvoj, plejparte latinidaj, sed ne nur.


Spite al la unueciga premo de amaskomunikiloj ekde la lasta jarcento, tiuj dialektoj kaj lingvoj rezistas. Ili tre malofte montriĝas en la nuntempaj filatelajoj, sed se oni retrorigardas jarcentojn antaŭe, filatelaj spuroj estas troveblaj.

Moviĝante de la Okcidento al Oriento, ni povas komenci per ekzemplo el la kongresurbo mem, kies nomo en la itala estas Torino, ĉefurbo de Piemonto, regiono kun proksimume 25 mil km². En la **piemonta lingvo** (de la gaŭlo-latinida branĉo, kun 700 mil parolantoj kiel dua lingvo), la urbo nomiĝas TURIN, kaj tiel legeblas en poŝta stampo sur prafilatela letero, sendita en 1790:



Ni iru iom suden, survoje al la centro de la itala “boto”, kaj haltu en Umbrio, kun proksimume 8 mil km² kaj 830 mil loĝantoj. Tie troviĝas Foli-

gno, itala nomo de iama romia kolonio “Fulginium”. Sur letero el la fino de la 18-a jarcento oni trovas ruĝan stampon kun ĝia nomo en la **umbra lingvo**, FULIGNO [fulinjo] (kun la “U” klasike skribita kiel en la latina, “V”, ĝis la duono de tiu sama jarcento):



Reire al la nordo ni trovas la faman urbon Padovo, universitata urbo kaj pilgrimejo de katolikoj pro la portugalo Sankta Antono de Padovo (1195-1231). En la itala Padova, ĝia nomo en la **venecia lingvo** estas PADOA [padŭa]. Belan ruĝan stampon kun tiu nomo oni povas vidi sur la dorso de letero sendita al registara instanco en la Respubliko Venecio, en 1763:





Ni alvenas al la plej orienta parto de norda Italio, Triesto. Kunfluejo de kulturoj, iam parto de la Aŭstrohungara Imperio, tiu grava havenurbo havis grandan influon de la aŭstra kaj slovena kulturoj. En la **germana lingvo** TRIEST [*trist*], la vorto estas legebla sur la stampo de tiu ĉi letero el 1840:





En la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj estas multaj parolantoj de la slovena lingvo kaj la nomo de la urbo estas TRST, tiel, sen vokaloj. La vorto estas videbla en surprisitaj italaj poŝtmarkoj post la invado de Jugoslavio, je la fino de la Dua Mondmilito.

Triesto, kiu landlimas kun Slovenio, fariĝis urbo de Italio en 1954.

La historio kaŝas sin en filatelaĵoj kaj nia plezuro de filatelismo estas pluki ilin...

ESPERANTO EN FILATELA EVENTO DE BRAZILIO

Pro la festado de la 35-jariĝo de CTC-Centro Temático de Campinas (Brazilo), la filatela pritema klubo en kiu membras nia klubamiko James Piton, Esperanto aperis en diversaj okazoj.

James proponis al sia klubo la realigon de 60 ĉiutagaj publikaĵoj (en WhatsApp, Facebook kaj en la retejo de la klubo - <https://ctc-campinas.org.br/pilulas-filatelicas-do-ctc/>) por anonci la datrevenon sed ankaŭ fari klerigan agadon. Ĉiu publikaĵo estis dediĉita al unu kategorio de filatela materialo uzebla en kolektoj. Li nomis tiujn tekstojn “piloloj” kaj ili ricevis entuziasman akcepton inter filatelismo tra la tuta Brazilo.

Bildoj de E-filatelaĵoj montriĝis en pluraj el ili, kiel ekzemple:




“Pilolo” n-ro 39, kiu klarigas pri provaĵoj kaj montras la brazilan pm-on pri la jubileo de Esperanto (1937) en du aliaj provkoloroj, blua kaj bruna.

La piloloj havos version en Esperanto kaj baldaŭ estos alireblaj en la retejo de ELF-AREK, kiel Bilda Terminareto, kaj ankaŭ kiel cifereca libro elŝutebla.

En solenaĵo de la 7-a de Oktobro en Campinas, en Universitato Mackenzie (152-jara institucio), aldone al historia panoramo pri la agado de tiu klubo, prezentiĝis ankaŭ kvar fakaj prelegetoj, inter ili tiu de James en la portugala, kies tradukita titolo estus: “Neakceptebla lingvo - konsideroj pri poŝta cenzuro kaj lingvoj”, en kiu Esperanto estis plurfoje menciita. Ĝi estas koncizigita versio de la prezento, kiun James faris en Torino, dum la 45-a Esperantologia Konferenco, kadre de la ĉi-jara Universala Kongreso. En porokaza filatela monstreto en la universitato, parto-

SUBSKRIBOJ DE ZAMENHOFOJ


Elda DOERFLER



GALERIO DE ZAMENHOFOJ: tiu ĉi estas la titolo de libreto, bone konata de ĉiu ajn brava esperantisto, kiu estis eldonita en Varsovio, 16.12.1924, ĉe la fama eldonejo de *Heroldo de Esperanto*, Köln, Germanujo. Estis ĝuste ĝia redaktoro Teo Jung kiu sugestis al ĝia verkonto: “kolekti la plenan kompletan de tiuj, kiuj formas la nedisigeblan Zamenhofujon”. Tre plaĉa tiu ĉi dirmaniero, ĉu ne?

Kaj kiu estis la aŭtoro? S-ro Edward Wiesenfeld, esperante Eduardo aŭ Edvardo, kiu foje subskribis ankaŭ per la pseŭdonimo *Lonkopolski* siajn artikolojn aperintajn en multnombraj E-publikajoj. Lia kaŝnomo aperas frontpaĝe de la revuo *Vegetarano*, organo de la *Vegetara Ligo Esperantista* kaj de la


Movado por ĉasta vivo, inter la “Naciaj sekretarioj de V.L.E”, krome sub pluraj raportoj aŭ priskriboj koncerne vegetarismen. E. Wiesenfeld, lingva komitatano, motoro de la pola E-movado, sukcesis verki tiun valoran libreton danke al sia striktaj ligoj kun la Z-familio, kaj al la helpo de Felikso, Leono kaj Hermelin, gefratoj de la Majstro, kaj kompreneble la edzino Klara. Pro kio ĝi estas tiom grava? Ĝuste pro “*sia aŭtentikeco, (ĉar ĉio ĉerpita el la unuaj fontoj) kaj estas la unua kaj la sola dokumentaro en la mondo, kiu, kune kun la ‘Vivo de Zamenhof’ (E. Privat) kaj ‘La*



lastaj tagoj de d-o Zamenhof (Jung kaj Oberrotman) povas formi plenan kompletan. Ĝi estas pliriĉigita per la portretoj de ĉiuj Zamenhof-anoj kaj per genealogia arbo.

Sur la antaŭa paĝo, pk-o el 13.01.1936 kun subskribo de s-ro Wiesenfeld. Por ni kolektemuloj, estas interese ekscii, ke - supozeble! - ankaŭ li emis konservi esperantaĵojn: fakte per tiu pk li estis dankinta la francan sendinton, pro lia promeso havigi al li la "italajn kongreskarton kaj insignon" certe pri la UK 1935 en Romo. Li finas sian mesaĝon per peto "ĝenerale memori pri mi ĉe ĉiu ajn esp-a okazantaĵo". (NdR: *bedaŭrinde la karto estas difektita per du rondaj truoj, faritaj supozeble de ĝia antaŭa posedanto*).

Ne nur tamen li 'kolektis' informojn kaj fotojn Zamenhofajn, sed aparte sin dediĉis al la figuro de Felikso Z, la kvina naskito de Marko kaj Rozalio (1868-1933). En sia antaŭparolo de la *Verkoj de FeZ* - 'Plena Verkaro de Dro Felikso Zamenhof', E. Wiesenfeld rakontas ke li "kolektis ĉiujn artikolojn disponeblajn", tial "ŝajnas" ke "en ili la vivo kaj agado de FeZ estas plenplene elĉerpita. Nenio plu estas aldonebla". La enkonduko longas sep paĝojn kaj dum legado de tiuj linioj, klare evidentas liaj senfinaj admiro, estimo kaj amo al Felikso, alte respektinda pro sia E-agado, sindona helpemo al la Majstro kaj elstara verkisto, tiom ke li eĉ aŭdacas aserti, ke "originalan literaturon esperantan iniciatis ĝuste F.Z.", kvankam post tiu esprimo li aldonas "Kiu scias? Eble eĉ antaŭ ol Esperanto ekzistis publike." Pli poste, li ankoraŭ plue honoras lin per jenaj vortoj: "... tre tre talenta verkisto, pensulo, moralisto, etikulo kaj ... poeto". Fakte, plurajn versaĵojn li aperigis en sia antaŭparolo, unu el kiuj mi ŝatas al vi prezenti, por ke oni konatiĝu kun aŭtoro malmulte konata de la nuntempa esperantistaro (inkluzive de mi mem!).



FeZ - foto el 1935,
aperanta en la libro.

*Kuraĝe ni puŝu nin for de la bordo,
Milvoĉe eksonu la kanto,
Mileŝe resonu potenca akordo
De l' kant' nia pri Esperanto.*

Marŝo de maristoj - 1889

Noto: La 271-paĝa libro de FeZ, eldonita en 1935 de *Literatura Mondo*, estas legebla ĉe la Internacia Esperanto-muzeo Vieno - Aŭstria Nacia Biblioteko. Jen sube la ligilo:
https://digital.onb.ac.at/RepViewer/viewer.faces?doc=DTL_7473461&order=1&view=SI-NGLE



Dum retumado cele al preparo de ĉi artikoleto, hazarde mi trovis la supran foton, faritan okaze de la 1^a Tutpola E-Kongreso, Varsovio, 4.VI.1922, ĉe la tombo de nia Majstro. Sur ĝi, de maldekstre: Edvardo Wiesenfeld, Klara Zamenhof, Oto Bujwid, Paulina Muszkatblatt, Stanisław Essigmann, Leo Belmont: ĉiuj estis membroj de la Organiza Kongresa Komitato.

La suba karto, kiun certe vi jam vidis kaj verŝajne eĉ posedas, estas aparte atentokapta, ĉar je la malfronta parto troviĝas du interesaj subskriboj.





Jen ili: unu estas de F. Zamenhof kaj la alia de Rosa Junck, sur pk eldonita okaze de "IV Internacia Esperantista Kongreso 16-22 de Aŭg. 1908", Dresdono, Germanio

Biografion pri la tre amata frato de Lazaro Ludoviko mi ne prezentos, ĉar pri li eblas legi plurloke: en *Enciklopedio de Esperanto*, en pluraj ĵurnaloj/revuoj, en ttt-ejoj, k.a. Tamen kelke da kuriozaĵoj povus vin instigi konsulti la diversajn fontojn je dispono, por pli profundigi vian konon pri li.

Al demando: "Kun kiu unuan fojon LLZ parolis Esperante?" ĉiu certe respondos: "kun Antoni Grabowski! Eĉ la ŝtonoj scias tion ĉi!" Ne plene ĝusta respondo: la Aŭtoro de Esperanto konversaciis ofte kun Felikso, ellerninta la lingvon jam en sia knaba aĝo. Tiu ĉi fakto helpis LLZ-on konvinkiĝi pri la vivebleco de la nova lingvo (ĉi tiel oni komentis en *Pola Esperantisto - In memoriam Felikso Zamenhof, jan. 1934, 28-a jaro*). Post ĉ. tri jaroj, en *Pola Esperantisto*, jaro 1937, paĝo 60, oni atentigas ke jam en la jaro 1888 li verkis grandiozan poemon, - do unu jaron post la apero de Esperanto -, kun titolo *Vizito de la steloj sur la tero*, publikigita poste en *La Esperantisto*, N-o 9, septembro 1891, 2-a jaro. Valoras la peno ĝin legi! Frandu nur ses versaĵojn, el la poemo *Bruas vento*, sekvapage, rilate kiun esprimis siajn impresojn la recenzinto Isaj Dratwer:

Vere, tre talenta devis esti F. Z., - tion ĉi li asertas - se li [...] scipovis forĝi en nia tiam infanaĝa Esperanto tiajn rimojn kaj tiajn ritmojn. Ĉu vi kredas, ke en unu el siaj plej fruaj kreaĵoj [...] li jam uzis onomatopeajn formojn? Kaj kun kia majstreco! [...] Per konvena adapto de vortoj kun la sono "r" la poeto perfekte reproduktas la krakadon de rompiĝantaj branĉoj kaj balanciĝantaj arbokronoj...

BRUAS VENTO - FEZ

Rondas, bruas, arbojn skuas
Bruemulo vento.
Ŝanĝas, ŝiras kaj detruas.

Tremas fundamento.
Falas branĉoj, velkas floroj,
Verdiĝas aromoj....



Malgraŭ ne apartenanta al la “subskribaro de Zamenhofoj”, indas priatenti la duan signaturon, tiun de Rosa Junck, el Bordighera, Italujo. Nur kelkaj informoj pri ŝi: nask. en 1850, en urbo Tábor, Ĉeĥio, tiam sub regado de Aŭstrio-Hungario; mort. 1929, Bordighera. Ŝi ekloĝis en Italio en 1890 kaj esperantistiĝis en 1897. Okaze de la 1^a UK - 1905, ŝi recitis poemon, sekve de kio oni proklamis ŝin “reĝino de Esperanta deklamo” kaj LLZ mem difinis ŝin modelo de Esperanto-prononco. Kune kun Clarence Bicknell, ŝi estis fondinta en 1910 E-grupon en Bordighera (regiono Liguria). Rosa Junck multe verkis en kaj pri Esperanto kaj ankaŭ tradukis el la itala al nia lingvo.




Sed ni revenu al Zamenhofoj: jen dua pk, plivalorigita per konataj nomoj. Unue, rigardo al ofte vidita bildo, bunte desegnita, pri urbo Nurnbergo, gastiginta la 15^{an} UK^{on}, kiu bonvenigis rekordan nombron da esperantistoj: 4 963.

Ni turnu la poŝtkarton, kaj jen bela surprizo!

Eĉ tri estas la subskriboj de gravuloj, el kiuj la plej renomata estas tiu de Klara Zamenhof.

Sekvas M. Moscheles kaj J. M. Warden.



Bedaŭrinde de la pk-malfronto defalis la surgluta poŝtmarko, ne bone videblas la stampo kaj tro fuŝita estas la adreso de la ricevinto. Nu, malgraŭ ĉio ĉi, miaopinie, entute inda je kolekto. La elsendo-dato estas: la 7^a de aŭgusto 1923, iom kovranta la UK-stampon.

Io rakontendas ankaŭ pri du el la subskribintoj, nome pri M.(argaret) Moscheles kaj J.(ohn) M.(abon) Warden.



Margareth Sobernheim naskiĝis en 1854, en Berlino, iama Prusio, kaj en 1875 edziniĝis kun Felix Moscheles. Ili konatiĝis en Germanio, kie ambaŭ studis pentro-arton. En 1893 ili kunvojaĝis al Nord-Afriko, kie, en Alĝero, ŝi faris la ĉi-flankan

verkon: *Morto en Alĝero*. Tiu pentraĵo estis ekspoziciita en la Reĝa Art-Akademio de Londono dufoje (1905 k 1912) kaj en aliaj publikaj britaj muzeoj. Ŝia edzo lernis esperanton en 1902 kaj supozeble, eĉ se neniuloke konfirmite, ankaŭ ŝi studis la internacian lingvon samperiode.

Felix Moscheles (1833-1917) estis vere talenta artisto, specialisto pri portreta arto: unu el inter liaj eminentaj modeloj estis ankaŭ nia Majstro. La apuda ole-pentraĵo, el 1907, troviĝas nun en la Esperanto-Domo, Brita E-Asocio, Barlastono.



La geMoscheles estis intimaj amikoj de la paro Zamenhofa: LLZ tre admiris Felikson, pro liaj pacistaj ideoj, pro lia fervorega amo al Esperanto. Okaze de lia 80-jariĝo, li tion ĉi telegrafis al li: *Konservu plenege, amiko plej kara, viklecon kaj sanon ĝis festo centjara*”.

Bedaŭrinde li pli frue mortis je la 22^a de decembro 1917, samjare de lia Amiko. La edzino Grete mortis en 1924, unu jaron post Nurenbergo. Ŝi aktivadis ĝislaste en la esperantista, pacista kaj vegetarana movadoj.

John Mabon Warden: kiu li estis? Li naskiĝis en 1856 (laŭ *EdE* k *Vikipedio*; 1857 - laŭ *Flandra Esperantisto*, eld. j. 1933) en Edinburgo, Skotlando, kaj mortis en 1933, samurbe. Esperantisto ekde 1903 (laŭ *EdE* k *Vikipedio*; 1904 (laŭ *Flandra E-isto*, eld. j. 1933). Li laboris kiel “asekura matematikisto” por skota Kompanio, dum 50 jaroj. Li ĉeestis la UK-n en



Bulonjo ĉe maro (1905) kaj poste partoprenis en pli ol 100 kongresoj, ĉu naciaj ĉu internaciaj. Li aŭtoris, kun Jean Baird kaj William Harvey, *The Edinburgh Esperanto pocket dictionary - La Edinburga poŝvortaro de Esperanto* (unua eld. en 1915), sed lia plej grava plenumita laboro estis la eldono de la *Biblio en Esperanto*, prezentita dum la Edinburga UK, 1926: li rolis kiel ĉefredaktoro. Afableco, ĝentileco, modesteco, amikiĝemo estis liaj precipaj karakter-trajtoj.

Menciindas, ke post la morto de prof. Cart li iĝis, pro la grandaj estimo kaj plenfido de siaj kolegoj, prezidanto de la Akademio de Esperanto (*Flandra Esperantisto*, jaro 1933, laŭ tiea nekrologo).

Kaj nun venas la plej malfacila parto de ĉi skribaĵo, nome paroli pri la tria subskribinto. Kion diri pri ŝi? Kion diri pri Klara Z. kio estu 'freŝe' nova, neniam antaŭe dirita aŭ gurde redirita? Ŝian biografion konas ja preskaŭ ĉiu esperantisto, samkiel bone konatas tiu de nia Majstro: li estis la Esperanto-Patro, dum ŝi plene meritis la nomon de Patrino. Nenio alia aldonendas. En ĉiu samideana koro ŝia memoro nestas tute apuda de tiu de ŝia tre amata edzo. Post lia morto, Esperanto plenigis ŝian tutan ceteran vivoparton kaj ŝi restis, ĝis sia lasta tago sur ĉi tero, fidela al Li kaj al la Esperanta idealo. Tial transdonindas la vorto al Teo Jung, kiu per sia poemo, publikigita unuapage de *Esperanto Triumfonta* (n-ro 224; 13.12.1924) precize interpretas la sentojn de la iamaj kaj nunaj Esperantanoj.



*Intencis festi ni, sed - devas plendi.
Ĉiel' nigriĝis. Nokto kovris vojon.
Ekfalis fulmo en la festoĝojn
Por funebrige niajn korojn fendi.
Anstataŭ ĝojo - regas nur doloro.
Terura bat' de senkompata sorto!
Plej noblajn korojn avidema Morto
Forrabas ĉiam en tro frua horo.
Jam staras Esperanto orfigite:
Post sia Patro perdis ĝi Patrino.
Animo ŝia flugis en senfinon
Renkonte al la Majstro altspirite.
Sed ni, ĉe ŝia tombo ariĝante,
Promesu, ke per-age kaj -parole
Ni por la orfo penos plejbonvole,
Al venko kaj triumf' ĝin kondukante.*



Sed ne finiĝas tie ĉi la 'novelo' pri la "subskriboj de Zamenhofoj".

Maldekstre: Pk kun foto de nia Majstro, eldonaĵo de Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin, sendita de Varsovio la 22^{an} de februaro 1925 al s-ro H. G. Denisban (aŭ *Denistan*?) en Camaguey, Kubo. Alvendato: 18/3/25. La subskribinto estis Sofio Zamenhof. Ŝi respondis al kondolenco letero de kuba konato, sekve de la morto de sia patrino.

Estimata samideano

Koran dankon pro via amika letero kaj kondolenco. Mi estis vere kortuŝita ricevinte ĝin.

Kun samideana saluto

Sofio Zamenhof

Varsovio str. Królewska 41.



Pri la figuro de Sofio Zamenhof donas tre ĉarman prezenton E. Wiesenfeld, en sia *Galerio de Zamenhofoj*: kial ne profiti de lia bona konado pri ŝi? "Vigla, sprita kaj vivoplena: tipo elsaltinta kvazaŭ ĉampankorko el la trankvila, kvietaj kaj solida flegmularo Zamenhofa, estas f-lino Sofio



(tiel!). [...] Ĉiam gaja, ŝi kun ĉiu amikiĝas, rapide ekkonas la internan valoron de homo kaj forĵetas ĉiujn konvenecajn formojn farigante tiamaniere ofte malglata, kruda, sed... treege simpatia.”

Belegaj vortoj, ĉu ne?

Pli poste la aŭtoro informas, ke ŝi flue parolis Esperanton, ke pri ĉio rilata al Esperanto plej detale ŝi okupiĝadis, sed ke “ne aktive partoprenas la esperantistan vivon”. Kion envere volis diri s-ro Wiesenfeld per tio? Ŝi vizitadis kunvenojn, tre multe helpis sian patron en la ordigado kaj kompletigado de lia biblioteko kaj, kiam la patrino kuŝis malsana, ŝi anstataŭis ŝin “en ĉiuj korespond aferoj”. Ĉu eble, ĉar Sofio ne engaĝiĝis en agadoj por-esperantaj?

Fraŭlino Sofio naskiĝis en Varsovio, la 13^{an} de decembro 1889 (LLZ naskiĝis la 15^{an} de dec) kaj mortis, gasumita, en la koncentrejo *Treblinka*, en aŭgusto aŭ la 12^{an} de septembro 1942 (ĉi lasta dato trovita nur en Vikipedio). En sia libro *La Familio Zamenhof*, Zofia Banet-Fornalowa skribas, ke ŝi mortis aŭ je la 6^a aŭ je la 8^a de aŭgusto. Supozeble neniam oni ekscios la precizan daton.

Mi deziras fini per nur kelke da vortoj de la aŭtorino rilatantaj al Sofio: “El la pristudo de ŝia tuta vivo, ŝi evidentiĝas kiel homo kun riĉa personeco, bonanima, respondeca kaj plene dediĉita al Esperanto”.



Espereble ĉi priskribo estis por vi interesa: ĝi eliĝis el mia *plumo*, ne pro sensenca pava parado de signaturoj Zamenhofaj, sed pro amo al E-historio, al nia Majstro kaj lia familio, al deziro esplori por malkaŝi prie ne tiom konatajn detalojn, por alproksimiĝi ankaŭ al aliaj esperantistoj kies subskriboj kunestas sur tiuj pk-oj malnovaj, foje eĉ pli ol jarcentaj. Tuŝi tiajn kartojn, kiuj estis tuŝitaj de niaj karaj antaŭuloj, donas al kolektentulo grandan nepriskribeblan emocion, kio daŭre instigas plu kaj plu, pli kaj pli, profunden prifosadi.

Konklude, estus interese por ĉiuj, relegi du antaŭajn LVL-artikolojn, aperintajn unu, en LVL-185, dec. 2020, kun titolo *Kiaj patroj, tiaj filoj!* de James Rezende Piton; la alian, en LVL-188, dec. 2021, *Monografio pri la Gotha-letero de LLZ*, de Albert Boon, en kiuj aperas la subskribo de...???

Je la 6-a paĝo bonvolu legi 3 aldonajn notojn koncerne ĉi tiun artikolon.

POŝTREPAGO (*NACHNAHME*) - PAGU MIN, BONVOLE!

James REZENDE PITON

Trovita en la reto, tiu ĉi karto por POŝTREPAGO estis speco de “inversa poŝtmandato” de la revuo *Esperanto*, uzita en 1912, de Genevo al Liono. Anstataŭ sendi monon, per tia dokumento oni petis ricevon de sumo, kvazaŭ fakturo. Tio okazis en la ricevo de la avizo kaj la mono iris al la petinto per poŝtmandato. La internacia normigo de la sistemo por repagaj korespondadoj estis aprobita en 1892 de UPU-Universala Poŝta Unio. La triangulo (formato de la etikedo, sed ankaŭ stampe oni ĝin trovis) estis parto de la konvencio kaj specialaj formularoj startis en Germanio en 1910. En la fina sumo jam estis la kompenso pro pago de la poŝta servo (registrita sendaĵo).



Dato de l'poŝta stampo.

Estimata Samideano,

Laŭ la avizo alsendita al vi, ni, ricevinte nek vian reabonon, nek la informon ke vi ne deziras reaboni, havas la honoron enkasigi vian reabonon al la internacia gazeto *ESPERANTO* per la poŝto, aldonante la poŝtelspezojn, t. e. entute § 2.20, (luksa eldono § 2.70).

Ni tre petas, ke vi bonvolu favore akcepti tiun repagon kaj daŭrigi al nia gazeto vian apogon.

Kun antaŭa danko.

ESPERANTO
10, Rue de la Bourse, 10
GENÈVE (Svisujo).

Formulo 2 (2 a eld.) — Esperanto

La ricevinto estas nia “malnova konato”, la tiama “dojeno” de la Movado, fama d-ro Henri Dor (1835-1912), kuracisto, kiu studis en sep landoj. D-ro Dor aperis kiel la unua en la serio de karikaturaj poŝtkartoj desegnitaj de Jean-Robert kaj eldonitaj kaj mankolorigitaj de s-ino Alice Farges inter 1910 kaj 1913.

Verŝajne li eĉ estis la unua karikaturo de la serio, ĉar unu el la kartoj havas fotografiecan aspekton, farita surbaze de nigra-blanka desegnaĵo, verŝajne kiel eksperimento.

Ĝi estis eldonita tia, sed ĝi reaperis poste presita kiel la ceteraj, kaj mankolorigita per akvarelo.



Tiu karto cetere aperas en la karikaturo de s-ino Alice Farges mem, lia samurbanino, antaŭ ŝia “budo”.





Ĉu li pagis la abonon, ni ne scias, sed li ĉiuokaze ne ĝuis eĉ la sekvan numeron de la revuo: la peto pri pago forsendiĝis en la 7-a kaj li forpasis la 29-an de Oktobro.



TORINA UK 2023 KAJ FILATELO

Emblemo de la kongreso estis la fama *Mole Antonelliana*, kies traduko en E-to ne estas tiom eleganta - en la kongresa bulteno oni parolas pri *Konstruajego Antonella*, laŭ la nomo de arkitekto *Antonelli*. Fakte tiu *Mole* iel signifas ‘monumentan konstruaĵon’, kio rilatas la grandiozecon de la tuta strukturo. Sed ni parolu pri filatelajoj. Aperis, bonŝance, stampo, per kiu oni povis ornamati siajn elsendaĵojn. Ruz- kaj saĝ-filatele, sur la poŝtkartojn estis algluitaj pm-oj el 2013, kun la bildo de la *Mole*.


Bedaŭrinde ne estis faritaj glm-oj. Ja, tiu bela tradicio pli kaj pli oni flankenmetas, precipe en ĉi lastaj jaroj, probable ĉar tiu paperpeceto ŝajnas ‘tro eksmoda, malmoderna, ne plu uzinda, nur kolektemuloj ŝatas tiaĵojn...’. Jes, povas esti prava ĉi aserto, sed, miaopinie, ankaŭ tiuj, plenrajte, apartenas al la historio de Esperanto kaj de nia movado, ekz. kiel etaj atestantoj de la evoluo aŭ malevoluo de la grafik-arto.

e.d.



--32 mm--

--38 mm--



EN POŝTOKESTO

Japana amiko, *s-ro SOMEKAWA Takatosi*, informas pri nekonata E-aerogramo.

Per siaj letero kaj aldonitaj kopioj, li sciigas, ke en la lasta tago de pasinta septembro la Japana Poŝto decidis ĉesigi la vendon de aerogramoj, ĉar neniuj plu uzas ilin. “*Kiam mi deziris aĉeti ĉi aerogramon, klarigis nia japana ligano, la poŝt oficisto serĉis ĝin en la stokejo*”. Do mi estas bonŝanca ricevi tian *ontan*

araĵon: ĝi nun kuŝas en mia arkivo kaj probable estos unu el la lastaj kiu flugis de Japanio al Italio. Sed nia komuna amiko, la karmemora MAEKAWA Haruja, posedis aerogramon, private faritan de li iam en la 1960^{aj} jaroj, ĉar tion ĉi oni permesis ekde 1964. En




Italio nek pm-ojn nek aerogramojn eblas eldoni private. Sur la suba aerogramo estas presitaj verdkoloraj E-klarigoj pri la skriboj japanlingvaj:

Antaŭa flanko: **AEROGRAMO
PER AERPOŝTO
ESPERANTO** (kun
verda stelo)

Dorsa flanko: **Nomo kaj adreso de la
sendinto
Nenion enmetu nek
algluu al tiu ĉi letero.**

Tiu ĉi unikaĵo nun estas en la manoj de S-ro SOMEKAWA, kiu ĝin ricevis donace de nia neforgesebla MAEKAWA Haruja.

Malfermu ĉi tie



Due faldu ĉi tie

ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda DOERFLER

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPUTRRXXX Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx-r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidanton.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be

ELF-ĀREK ttt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc



prenis lia unupanela kolekto “Esperanto tra la kribrilo de poŝta cenzuro”.

CTC tradicie festas ĉiun jubilean datrevenon per omaĝo al loka monumento. Ĉi-jare individua pm kaj la poŝta stampo montras muzikbudon konstruitan en Campinas en 1913, sur unu el la centraj placoj, dediĉita al Carlos Gomes. Tiu loka muzikisto (1836-1896) estis la unua neeŭropa operkomponisto sukcese akceptita en Italio, samtempulo de Verdi kaj Puccini, en la “ora epoko” de la operoj. Muzikbudoj estis kutimaj en ĉiu urbo kaj urbeto de Brazilo, sur la ĉefaj placoj, uzeblaj ne nur por muziko, sed

ankaŭ por anon-
coj, diskursoj, po-
litiko.

